Aligilo:Aligilo 03/12/2009 16.20 Pagina 1

Kotizoj

Kategorio:	Plena	Rabatita
1-a periodo (ĝis 2009.12.31)	60,00	30,00
2-a periodo (ĝis 2010.05.31)	75,00	37,50
3-a periodo (ekde 2010.06.01)	90,00	45,00

Kategorio Plena: Italo, membro de IEF por 2010 (nemembro devas plupagi la koncernan membro-kotizon)

Kategorio Rabatita: Eksterlandano, Junulo (naskiĝinta ekde 1986.01.01), Familiano de kongresano Plena, Handikapulo.

Infanoj ĝis 12-jaraĝaj (naskiĝintaj ekde 1999.01.01) kaj nemalhaveblaj akompanantoj de handikapuloj aliĝas senpage.

La kotizoj povas esti pagataj al:

Federazione Esperantista Italiana:
- poŝtĉekkonto 37312204 "Federazione Esperantista Italiana", IBAN-kodo IT94O 07601 01600 00003 73122 04;
- bankkonte IBAN-kodo IT06A 03069 09446 00000 36255 62;

UEA-konto: ikes-p

Kontante al unu el la LKK-anoj.

La kongresa kotizo estas persona kaj neredonebla, eĉ en kazo de nepartopreno al la kongreso.

La LKK kaj Itala Esperanto-Federacio havigos **invitleteron** al la eksterlandanoj kiuj ĝin bezonas por ricevi enirvizon, nur al kongresanoj, kiuj jam regule aliĝis kaj pagis la neredoneblan aliĝkotizon.

Ĉiuj informoj pri alveno de via aliĝo, de viaj mendoj, de viaj pagoj, kaj ĉiuj informoj pri la Kongreso estas liverataj **ekskluzive** pere de la retpaĝoj de la Kongreso:

http://italakongreso.esperantoitalia.it

KONTRIBUU AL LA PROGRAMO

Dum la Kongreso, mi pretas kontribui al la programo jene:

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

June, sune, kune

Itala Kongreso de Esperanto, ĉijare pli granda, pli junula, pli internacia!

Ĉu vi volas pasigi semajnon plaĝumante ĉe la belega Adria maro? Itala maro atendas vin en Linjano Orsabla!

Ĉu vi volas satigi vian stomakon per itala kuirarto en itala proverbefama vina regiono? Venu al Itala Kongreso en Friulo!

Ĉu vi volas lerni kiel instrui Esperanton aŭ okupiĝi pri Eŭropo? Bonajn seminariojn vi trovos en Linjano!

Ĉu vi volas ĝui la belon de nordorienta Italujo per ekskursoj al la unika Venecio kaj la eŭropega Triesto? De Itala Kongreso ni kondukos vin al la plej belaj lokaj lokoj!

Ĉu vi volas trovi viajn italajn amikojn kaj kune ĝui ĉemaran semajnon? Venu al ni en Italan Kongreson!

Ĉu vi volas lerni la italan lingvon aŭ Esperanton? Intensivaj kursoj de la itala kaj de Esperanto (por komencantoj kaj por progresantoj) okazos en Linjano!

Ĉu vi volas danci en granda rondo kun la homoj el la tuta mondo dum mojosa JoMa koncerto? Ĉestu lian koncerton en Linjano!

Sed por plej bone kune umi tiun semajnon ni bezonas VIN!

77ª ITALA KONGRESO DE esperanto

Lingvaj rajtoj
en la Eŭropa multkultura socio

Linjano Orsabla (*Lignano Sabbiadoro*)
2010.08.21-28

FEI
Federazione Esperantista Italiana

Aligilo:Aligilo 03/12/2009 16.20 Pagina 2

La jubileo de IEF

FEI - Federazione Esperantista Italiana, la oficiala itallingva nomo de IEF, estis fondita en Florenco en 1910.

Ĉi-jare do la organizita itala Esperanto-movado festas sian centjariĝon.

La evento, kiu estos festata plurloke tra la tuta lando kaj tra la tuta jaro, ricevos sian apartan atenton ankaŭ dum la Itala Kongreso, dediĉita kaj al rememoroj kaj, ĉefe, al planoj por la ceteraj jarcentoj.

Por atingi Linjanon (*Lignano*)

Per aŭtomobilo - aŭtoŝoseoj - Aŭte eniru la aŭtoŝoseon A4 Venezia - Trieste aŭ la A23 Tarvisio-Venezia kaj eliru ĉe Latisana, daŭrigante laŭ la ŝtata strato SS 354 al Lignano.

Per buso - bus-stacioj - Busoj liniaj ligas ofte Lignano al Italaj kaj Eŭropaj urboj. Informojn pri la horoj de la busoj riceveblas de Biglietteria Autostazione - Viale Gorizia, 26 - Tel. 0431 71373 www.saf.ud.it

Per trajno - fervojaj stacioj - Trajne vi atingu la stacidomon Latisana kiu distancas nur 20 Km de Lignano Sabbiadoro, eliru le la malantaŭa flanko de la stacidomo: tie troviĝas la bus-stacio de kie ofte startas busoj al Lignano. www.trenitalia.com

Per aviadilo - flughavenoj - La flughavenoj plej proksimaj estas "Friuli Venezia Giulia" «TRS» en Ronchi dei Legionari je 58 Km de Lignano Sabbiadoro, "Marco Polo" «VCE» de Venezia je ĉirkaŭ 100 Km kaj "San Giuseppe" «TSF» de Treviso je ĉirkaŭ 110 km.

La Itala Kongreso Eŭropa rendevuo

De kelkaj jaroj la kongreso de Itala Esperanto-Federacio fariĝis kompleta kultura Esperanto-rendevuo, kiu antaŭvidas, apud kaj krom la organiza parto (inaŭguro, asembleo, fakaj kunvenoj, ktp.), pli internacie interesan enhavon.

Karakterizaj estas la "**Seminarioj**", kelktagaj studunuoj pri specifa aspekto de Esperanto, gvidataj de internaciaj fakuloj. Ili celas tutmondan partoprenantaron, kaj okazas ekskluzive en la internacia lingvo. Ĉijare la seminariaj temoj estos **Didaktiko** (gvidata de Katalin Kováts) kaj **Lingvaj rajtoj en Eŭropo** (organizata kun Eŭropa Esperanto-Unio).

Gravas ankaŭ la intensivaj **kursoj de Esperanto** je la du bazaj niveloj (por absolutaj komencantoj, kaj por progresantoj) kaj, eksperimente, intensiva **kursoj de itala lingvo**.

Enestas la programon riĉa elekto de distraj aranĝoj (**teatraĵoj, filmoj, koncertoj**); al pluraj el ili estas invitta ankaŭ la loka loĝantaro.

Kaj ni ne forgesas la **turisman parton**: veni al la plej belaj urboj de Italujo kaj ne viziti ilin kaj iliajn ĉirkaŭaĵojn estus preskaŭ krimo: ĉijare la regiono ekskursenda inkluzivas Venecion, Trieston, la Veneciajn Vilaojn, kaj... nu, ni ne malkaŝu ĉion jam nun, ĉu ne?

Venu al la Itala Kongreso kaj ĝi kare restos en via koro kaj en viaj okuloj dum longaj jaroj...

La programon de la kongreso, la seminariojn, la kursojn, la prelegojn, la teatraĵojn, la koncertojn, la ekskursojn ni listigas en la ttt-paĝoj de la kongreso, daŭre aktualigitaj; relegu ilin ofte:

Retpaĝaro: http://italakongreso.esperantoitalia.it
Retadreso: kongreso@esperantoitalia.it

La LKK



Renato Corsetti Prezidanto
Bruĉjo Kasini Kongresa kunordiganto
Laura Brazzabeni Sekretario
Nicola Minnaja Kultura programo
Michael Boris Mandirola Junularo

Aligilo **Sendu al: Federazione Esperantista Italiana, Via E. Villoresi 38, I-20143 Milano, Italujo**
Retadreso: kongreso@esperantoitalia.it — Paĝaro: http://italakongreso.esperantoitalia.it

Nomo familia .....
Nomo persona ..... ☐ Viro ☐ Virino
Adreso .....
Poŝtkodo ..... Urbo .....
Lando ..... Ret-adreso .....
Telefon-numero(j) ..... Naskiĝdato (se post 1985.01.01) .....
Vegetarano ☐ Jes ☐ Ne ☐ Mi petas ne publikigi miajn nomon kaj adreson en la kongresa listo

Mi pagis per: ☐ pĉk al IEF 37312204, IBAN-kodo IT94O 07601 01600 00003 73122 04; ☐ UEA-konto "ikes-p";
☐ banka ĝiro al IEF IBAN-kodo IT06A 03069 09446 00000 36255 62; ☐ kontanta mono;
la sumon de ..... por .....

Dato

Subskribo